

# Ipl 57 (2/2006)

## Enhavo

<b>1</b>	<b>Novaj planlingvaj sistemoj.....</b>	<b>2</b>
1.1	<b>Kio estas KOD? Kiel ĝi funkciu? (LIU Haitao).....</b>	<b>2</b>
1.2	<b>Paraglot de <i>Tadeusz Ficowski</i>.....</b>	<b>6</b>
<b>2</b>	<b>Fonduso por subteno de interlingvistiko kaj esperantologio 7</b>	
<b>3</b>	<b>El universitatoj kaj altlernejoj .....</b>	<b>8</b>
3.1	<b>Historia paŝo en ĉina instituto de fremdlandaj lingvoj (Wu Guojiang) 8</b>	
3.2	<b>Ateliero pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo (Atilio Orellana Rojas).....</b>	<b>8</b>
3.3	<b>Pri nacia semiotiko en la komia ĉefurbo (Povilas Jegorovas).....</b>	<b>9</b>
3.4	<b>Pri eŭropa lingvo-politiko en Kaunas (Povilas Jegorovas).....</b>	<b>9</b>
3.5	<b>Antaŭ studentoj de lingvistiko en Kaunas (Povilas Jegorovas).....</b>	<b>10</b>
3.6	<b>Pri retoriko de Ivo Lapenna en la latva Jelgava (Povilas Jegorovas)....</b>	<b>10</b>
3.7	<b>Konferenco en la Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato (Aleksandr Melnikov) .....</b>	<b>10</b>
3.8	<b>Doktoriĝo de <i>prof. LIU Haitao</i>. .....</b>	<b>11</b>
3.9	<b>Diplomdisertaĵo pri la simbola lingvo LoCoS .....</b>	<b>11</b>
<b>4</b>	<b>Honorigoj por interlingvistoj.....</b>	<b>12</b>
4.1	<b><i>Hans-Jürgen Mattusch</i> 75-jara: interlingvistika bibliografio (Detlev Blanke) .....</b>	<b>12</b>
4.2	<b><i>Otto Back</i> 80-jara: interlingvistika bibliografio (Detlev Blanke).....</b>	<b>13</b>
4.3	<b>“Speciala Premio Eugen Wüster” por <i>Wera</i> kaj <i>Detlev Blanke</i> .....</b>	<b>15</b>
<b>5</b>	<b>Grandega perdo por la rumana movado: <i>Forpasis</i> <i>prof. d-ro Constantin Dominte</i> 1944-2006 (Ignat F. Bociort) ..</b>	<b>15</b>
<b>6</b>	<b>“Interlinguistische Beiträge” de <i>Detlev Blanke</i> .....</b>	<b>17</b>
6.1	<b>Recenzo (Věra Barandovská-Frank).....</b>	<b>17</b>
6.2	<b>Enhavtabelo de la libro “Interlinguistische Beiträge” .....</b>	<b>19</b>
<b>7</b>	<b>Bibliografio de la verkoj de <i>Reinhard Haupenthal</i> .....</b>	<b>22</b>

# 1 Novaj planlingvaj sistemoj

## 1.1 Kio estas KOD? Kiel ĝi funkcias?

de Liu Haitao

Communication University of China, Beijing

KOD estas planlingva projekto prilaborata ekde 2000. Ĝi estas evoluigita de „Eufo-instituto Dr. Vielberth“ en Regensburg, Germanio<sup>1</sup>. Laŭ la iniciatoro de la projekto, *Dr. Johann Vielberth*, KOD ne estas lingvo, sed ĝi estas sistemo por internacia komunikado<sup>2</sup>. Estas interese, kial la iniciatoro nomas sian projekton “sistemo”, se ĝi nur ludas similan rolon kiel aliaj planlingvaj projektoj. Oni ankaŭ neis, ke KOD estas programada lingvo por komputiloj aŭ sistemo simila por maŝina tradukado. Kelkdekoj da lingvistoj jam laboras kelkajn jarojn pri la projekto.


En tiu ĉi artikolo mi volas resumi KOD laŭ miaj konoj por interlingvistoj kaj por aliaj interesiĝantoj pri la projekto.

Ŝajnas al mi, ke oni nomas KOD ne lingvo pro tio, ĉar ĝi ne havas gramatikon. Tamen, oni esperas ke la sistemo kapablas prezenti ĉiujn lingvojn per siaj grafemoj kaj leksemoj. Tiel KOD fariĝos neŭtrala kaj interlingva komunikada sistemo por komunikado inter diverslingvuloj. Alidirite, KOD povas esti vidata perilo inter diversaj lingvoj. Por realigi tion, KOD-anoj unue devas eltiri el laŭeble multaj lingvoj la komunaĵojn. La lingvoj selektitaj funkcias kiel modelaj lingvoj. Tio nun koncernas jenajn lingvojn: Araba, Bulgara, Ĉina, Germana, Angla, Finna, Greka, Hinda, Itala, Japana, Rusa, Hispana, Turka, Hungara kaj Yorùbá.

La komunaj elementoj, kiujn havas pli ol unu lingvo, formas la kernon de KOD, kio ankaŭ klarigas sian nomon *KOD-global*.

KOD-global enhavas du bazajn elementojn: KOD leksemoj kaj markiloj.

La KOD-leksemoj disponiĝas por la komunaj signifoj, la markiloj por komunaj gramatikaj funkcioj. Por esprimi iujn specialaĵojn de individua lingvo, oni ankaŭ konstruis *KOD-lingual-special* por ĉiuj lingvoj, kiuj enhavas la leksemojn ne inkluditajn en KOD-global kaj la markilojn nur validajn por tiu difinita lingvo. La sekva bildo montras la strukturon de KOD sistemo, kiu enhavas du lingvojn: La Anglan kaj la Ĉinan.



<sup>1</sup> Kelkajn materialojn pri KOD oni povas legi en [www.eufo-institut.de](http://www.eufo-institut.de).

<sup>2</sup> Johann Vielberth (2003): An idea for an international system of communication. En: J. Vielberth & Guido Drexel (eds.) Linguistic Cultural Identity and International Communication. Saarbruecken: AQ-Verlag. p. 9-16.

La KOD-lingual-modulo por ĉiuj lingvoj konsistas el du partoj:

- a) La elementoj de KOD-global aperas en la konkreta lingvo;
- b) KOD-lingual-special-XXX enhavas ion specialan, kiu nur aperas en la difinita lingvo.


Kompreneble, tiaj specialaĵoj estas malgrandaj kiel montras la supra bildo.

Do, por ebligi interkomunikadon inter anglaj kaj ĉinaj parolantoj KOD-anoj devas konstrui la tri partojn:

- a) KOD-global
- b) KOD-lingual-special-angla kaj
- c) KOD-lingua-special-ĉina.

Ĉiuj tri partoj enhavas leksemojn por signifoj kaj markilojn por gramatikaj funkcioj. Interalie, KOD-global estas komuna por ĉiuj lingvanoj, kiuj volas uzi KOD-sistemon. KOD-lingual-angla kaj KOD-lingual-ĉina nur celas al la parolantoj de ĉi tiuj du lingvoj. Teorie, se mi volas uzi KOD por komuniki kun alilingvanoj, ekz. kun mia plumamiko Johano en Britio, mi devas lerni KOD-global kaj KOD-lingual-ĉina. Kaj Johano, por komuniki kun mi, devas lerni KOD-global kaj KOD-lingual-angla. Tio ŝajnas esti ĉio lernenda, tamen ni tuj vidos, ke tio ne sufiĉas.

Se post la ellerno de KOD mi volas komuniki ion interesan al Johano estas necesaj jena paŝoj:



Ŝajne kvazaŭ ĉio estas en ordo. Por respondi mian mesaĝon, Johano povas respondi al mi per KOD-lingual-Angla. Post kiam mi ricevis lian respondon, mi dekodas la enkoditan tekston per KOD-global. Tamen, eble subite mi volas surprizi Johanon per specialaĵo, kiu troviĝas en KOD-lingual-special-ĉina, tamen ne en KOD-global. Kompreneble, Johano ne povas kompreni mian tekston, ĉar li ne povas dekodi ĉiujn ricevatajn informojn per KOD-global. Por kompreni mian ĉinaĵon, li devas ankaŭ lerni KOD-lingual-special-ĉina aŭ ĉiam devas havi ĉe si la rilatan manlibron. Se Johano estas korespondemulo, li eble jam havas plumamikojn el pli ol dudek landoj. Tiam Johano devas lerni tro multajn KOD specialajn modulojn por interkomunikado kun siaj amikoj. Tio certe ĝenas lin multe, ĉar ni tuj vidos, ke KOD ne estas tiel facile lernebla kiel reklamite.

Laŭplane KOD-lingual-Angla kaj KOD-lingual-Germana estos kompletigita en la jaro 2005. KOD-global devas havi kompletan aspekton ĝis 2006 jaro (40000 leksemoj)<sup>3</sup>.

<sup>3</sup> Laŭ prezento de s-ro Kees Bakker (Commercial director of eufo institut, 2006-02-13), tiam, KOD jam havis internaciajn vortojn por 2620 nocioj, pli ol 10 000 signifaj unuoj jam estis difinitaj, krome pretiĝis KOD-lingual-English kaj KOD-lingual-German en siaj bazaj formoj, la manlibro por KOD-lingual-German jam estas detale prilaborita. S-ro Bakker montris al ni, kiel oni povas trovi la KOD signojn de la germanaj vortoj per la komputilo.



ekzistantaj lingvoj, estas la demando. Laŭ KOD-anoj la lernado de KOD ne estas pli malfacila ol lerni aliajn lingvojn. Jen estas kompara tabelo<sup>8</sup>:

<i>KOD-global</i>		<i>Lernaj bezonoj kompare kun lernado de fremda lingvo</i>
Vortaro aŭ leksemaro	unu signifo, unu vorto	egala
KOD markiloj	399 funkcioj tre sistema sen escepto	malpli
KOD fonemoj	42 selektiaj fonemoj	egala
KOD grafemoj	36 signoj	pli
<i>KOD-lingual-special</i>		<i>Lernaj bezonoj kompare kun lernado de fremda lingvo</i>
Vortaro aŭ leksemaro	esprimitaj en KOD grafemoj	ne aldona bezono
KOD markilo	tre malmultaj tre sistema sen escepto	malpli

Kompreneble, la lernebleco de la lingvo ne nur estas matematika komparo. Tion nur la praktiko povas pruvi. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne povas uzi KOD-sistemon.

Resume KOD estas interesa provo en la planlingva historio, kvankam KOD-anoj mem prefere nomas ĝin “sistemo”. Ni ne klare povas scii, ĉu KOD havos brilan futuron, kiel esperas ĝiaj kreantoj. Tamen la historio de planlingvo kaj interlingvistiko diras al ni, ke la sistemo ne estas senproblema. Jen kelkaj penseblaĵoj:

- Speciala grafemo sendube ne estas komforta por homoj, ankaŭ ne por komputilo.
- Internaciaj vortoj estas utilaj al lernado de la sistemo, tamen matematike kreataj 35000 vortoj ne estas facile lerneblaj por homoj.
- Ĉar KOD ne havas sian gramatikon, la lernanto devas lerni preskaŭ ĉiujn funkciojn en KOD-global, tio ĝenas.
- La ekzisto de KOD-lingual-special malutilas al interkomunikado inter diversaj lingvanoj, ĉar la ricevanto de mesaĝo eĉ devas regi la specialaĵojn de aliaj lingvoj.
- La KOD-sistemo ne povas formi kompletan sistemon kun sia sintakso kaj semantiko, tio malhelpas ĝian evoluadon.
- Lingvo ne estas pura teknikaĵo, ĝi evoluas laŭ sia vojo.
- Lingvo ne estas komercaĵo.
- Lingvo ne estas fermita sistemo.
- La disvastiĝo de la lingvo ne nur dependas de mono.

Kredeble ĉiuj ĵus menciitaj aspektoj influos la ensociiĝon de KOD. Kiel informita interlingvisto mi pesimisme antaŭvidas la futuron de la sistemo. Tamen la mondo ĉiam ŝanĝiĝas. Ni vidu kiel KOD evoluos kaj ĉu ĝi vere funkcios.

<sup>8</sup> La tabelo estas el la prezento de s-ro Kees Bakker, kiu faris la enkondukon por profesoro Feng Zhiwei kaj mi en 2004-12-07, Beijing.

## 1.2 Paraglot de Tadeusz Ficowski

Estas konate, ke daŭre aperadas novaj projektoj de planlingvoj, aparte en la reto, kiu donas vastajn eblecojn al ĉiu ajn lingvo-inventado, tre ofte tre fantazia. Estas malfacile sekvi tian fabrikadon, ĉar ofte nur temas pri skizoj aŭ la aŭtoro tuj komencis reformi ĝin aŭ tute ne pluokupiĝas pri sia projekto. Ankaŭ la motivoj por krei tiajn sistemojn estas malsamaj. Foje temas pri privataj lingvoj, do lingvo-ludaĵoj, foje pri eksperimentado kun lingvistika fono, kaj plej ofte tamen pri provo krei internacian komunikilon.

Fojofoje aperas superrigardaj studoj, kiuj klopodas kunigi la ĉefajn tendencojn kaj direktojn de tia lingvo-inventado, ekz. jenaj:

- *Barandovská-Frank, Vera* (2003): Archiv- und Werkstattseiten für Plansprachen im Internet. En: Blanke, Detlev (2003, Red.): Plansprachen und elektronische Medien. Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 6.-8. Dezember 2002 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 9. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V. p. 9-39.

- *Mannewitz, Cornelia* (2003): Science-Fiction-Sprachen im Internet. En: Blanke, Detlev (2003, Red.): Plansprachen und elektronische Medien. Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 6.-8. Dezember 2002 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 9. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 40-53

Sed ĝenerale en IpI ni ne povas sekvi tiaĵojn detale. Alia afero estas, se aperos projekto libroforme. Tio rilatas la manuskripton "Paraglot" de la polo Tadeusz Ficowski (1893-1958), kiu ellaboriĝis inter 1942-44. Gxin editoris Alicja Sakaguchi :

*Ficowski, Tadeusz* (2005): Paraglot. Język powszechny. (Editoris Alicja Sakaguchi). Poznan : Wydawnictwo "Rys", 372 p.

Jen fragmento el la pola nacia eposo „Pan Tadeusz“ en Paraglot:

*„Litvanio, patrio mea! Tu stem qual el sano:  
Quant on debem tu pretie, gnot soli humano,  
qua tu perdim. Me hodie vid, descript e sentiem  
ie tua tut lepido, nam ie tu languentem“*

(Fonto: Unua kovrilpaĝo)

La sama alineo en la Esperanta traduko de Antoni Grabowski (1918):

*Litvo! Patrujo mia! Simila al sano;  
Vian grandan valoron ekkonas litvano,<sup>9</sup>  
Vin perdinte. Belecon vian mi admiras,  
Vidas ĝin kaj priskribas, ĉar mi hejmsopiras.*

---

<sup>9</sup> Grabowski klarigas: „La sendependa Polujo konsistis el du ĉefaj partoj: Pola Krono kaj Litvo. La pola poeto estis naskita „litvano“, kion oni ne konfuzu kun „litovo“, ano de la litova gento en parto de Litvo.“ (Adam Mickiewicz: Sinjor Tadeo. Esperantigis Antoni Grabowski. Warszawa 1918, p.5).

## 2 Fonduso por subteno de interlingvistiko kaj esperantologio

*Jen dokumento, kiu certe pozitive influos la laboron de interlingvistoj kaj esperantologoj. Pri demandoj kaj proponoj oni sin turnu al la redaktoro de Ipl.*

1 De tempo al tempo ESF ricevas proponojn por subvencii eldonaĵojn kaj esplorojn en la fakoj interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝi intencas nun rezervi sumon de ĝis US\$ 10.000 jare en speciala fonduso por subteni tiajn iniciatojn.

2 La fonduson oni uzos por aljuĝi malgrandajn subvenciojn normale de \$2000 aŭ malpli por subvencii (a) eldonaĵojn en iu ajn lingvo en la fakoj interlingvistiko kaj esperantologio (per la termino “eldonaĵoj” oni celas kaj normalajn kaj elektronikajn eldonaĵojn), (b) disponigon al esploroj de signifaj materialoj aktuale nealireblaj aŭ nesufiĉe alireblaj, (c) vojaĝstipendiojn por esplorado aŭ konferencopartopreno se tiuj stipendioj kondukos al publikigeblaj produktoj.

3 Oni aljuĝos subvenciojn al individuoj aŭ institucioj (asocioj, institutoj, bibliotekoj, eldonejoj, ktp.) por helpi kovri, parte aŭ tute, la kostojn de eldonado, inkluzive la pretigon aŭ kompiladon de esplormaterialo, aŭ la koston de pretigado de materialo disponigota sur konstanta bazo pere de bibliotekoj aŭ aliaj esplorkolektoj, aŭ vojaĝadon ligitan al tiaj agadoj.

4 La nefinancajn aspektojn de la programo (inkluzive varbadon, intertrakton kun subvenciatoj kaj aplikon de ĉiuj kondiĉoj de la subvencioj) administros la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), kiu starigos malgrandan sciencan komitaton por juĝi proponojn kaj fari rekomendojn al la estraro de ESF surbaze de antaŭe interkonsentita tempo-skemo. Tiu komitato rajtas peti konsilojn de nekomitatanoj laŭbezone. Membroj de la komitato devas esti aprobitaj anticipe de la estraro de ESF. La estraro de ESF rezervas al si la rajton malakcepti subvenciproponojn aŭ redukti stipendiojn rekomenditajn de CED. Ĝi disponigos el la fonduso sumon ĝis \$500 por kovri rilatajn administrajn kostojn de CED.

5 Subvencio laŭ tiu ĉi programo devas rezultigi konkretan produkton disponigatan al esploroj je traktebla kosto kaj tra facile alireblaj kanaloj.

6 Neniu ento, individua aŭ institucia, rajtas ricevi pli ol unu subvencion pere de la fonduso en unu dekdumonata periodo. Tiu regulo ne aplikiĝas al subvencioj de ESF ekster la fonduso.

7 Aprobitaj projektoj devas antaŭenigi interlingvistikon aŭ esperantologion en signifa maniero.

8 Redaktaj kaj produktaj aspektoj de subvenciataj eldonaĵoj (inkluzive retajn eldonaĵojn) devas esti bone konceptitaj kaj ankaŭ administrataj de kompetentaj personoj.

9 Por maksimume internaciigi la uzeblon de la produktoj, ili estu prezentataj ne nur en la originala lingvo, sed se eble, ankau en la angla kaj en Esperanto. Se tio ne eblas, la produktoj krome havu almenaŭ enkondukojn, resumojn, retnavigilojn aŭ aliajn helpilojn en la angla kaj en Esperanto.

10 Ĉiuj aprobitaj projektoj devas enhavi temposkemon kaj limdaton por kompletigo. ESF rezervas al si la rajton reteni pagojn ĝis finkompletigo de la projekto je la antaŭe fiksita dato, kaj entute ne pagi subvenciojn por projektoj ne kompletigitaj ĝustatempe.

11 La fonduso ekfunkcios ekde 1 januaro 2007. ESF antaŭvidas financi la programon dum tri jaroj, sed rezervas al si la rajton nuligi ĝin iam ajn.

12 ESF rajtas de tempo al tempo redirekti al la administrantoj de la fonduso proponojn, kiujn ĝi ricevas, kaj kiuj ŝajnas taŭgaj por financado pere de la fonduso.

13 La administrantoj de la fonduso rajtas pludoni al ESF por plua traktado meritohavajn proponojn, kiujn ili opinias netaŭgaj por financado pere de la fonduso pro ilia amplekso aŭ komplikeco, aŭ ĉar ili ne estas kongruaj al la kriterioj de la fonduso.

14 Komitatano ne rajtas mem prezenti subvenciproponojn al la fonduso kaj devas deklari sian eventualan materian intereson rilate difinitan proponon. Komitatoj tamen rajtas prezenti siajn eventualajn subvenciproponojn senpere al ESF, ekster tiu ĉi programo.

15 La komitato prezentos raportojn al ESF pri sia agado de tempo al tempo laŭ interkonsentita temposkemo.

16 Ekzempleroj de finaj produktoj estu disponigataj al ESF kaj CED kaj al tiuj aliaj instancoj, kiujn CED preskribas en la kondiĉoj de la subvencio.

Esperantic Studies Foundation (ESF), Akceptita Marto 22, 2006

### **3 En universitatoj kaj altlernejoj**

#### **3.1 Historia paŝo en ĉina instituto de fremdlandaj lingvoj**

La 27-an de februaro 2006 la Liaoning-povinca Esperanto-Asocio (LEA), Ĉinio, kaj Liaoning-provinca Instrua Instituto de Fremdlandaj Lingvoj por Altlernejoj kunlabore funkciigis kurson de Esperanto-Historio en Historia kaj Kultura Instituto de Liaoning Universitato. 52 geinstruistoj (profesoroj kaj docentoj) el la fremdlandaj lingvaj institutoj (fakultatoj) de pli ol 20 altlernejoj en la provinco anoncis sin por la kurso. La lerno-libro adoptita en la kurso estis la ĵus eldonita libro “Evolua Historio de Esperanto”, kompilita de s-ro Liu Zhengkun, prezidanto de LEA kaj profesoro de la universitato, kaj s-ro Song Yunsheng, honora prezidanto de LEA. La instruistoj lernos Esperanton en la alia kurso krom tio ke ili sisteme lernos la evoluon historion pri Esperanto.

LEA celas eduki amason da altkvalitaj Esperanto-instruistoj por altlernejoj. Tiutage 85 studentoj ankoraŭ elektis Esperanton kiel nedevigan studobjekton kaj eklernis en du kursoj. Surbaze de bona komenco, LEA kaj Liaoning Universitato estas aktive kreanta medion por internacia kunlaboro en Esperanto-instruado. Por montri la vastecon kaj internaciecon de Esperanto ni kolektas ĉiun reagon (gratulo, propono ktp) kaj kompilas bultenon, poste dissendos ĝin al instancoj de la provinca kaj urbaj registaroj kaj la estroj de la altlernejoj, inkluzive tiujn kiuj ne sendas instruistojn.

Wu Guojiang. Vic-prezidanto de LEA. Adreso: s-ro Wu Guojiang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, 113008 Fushun Liaoning, Ĉinio Retadreso: [ghemelurboj@yahoo.com.cn](mailto:ghemelurboj@yahoo.com.cn) , [amikeco999@21cn.com](mailto:amikeco999@21cn.com) .

#### **3.2 Ateliero pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo**

Laŭ invito de la Studenta Asocio pri Ĝenerala Lingvistiko VOS, la 15-an de marto 2006 okazis ateliero pri Esperanto en la Universitato de Amsterdam (UvA). Tiam *docento Wim Jansen* resume prezentis faktojn rilate al Esperanto kaj al Andreo Cseh kaj lia metodo. Sekvis



provleciono laŭ la rekta metodo gvidita de *Atilio Orellana Rojas*. La ĉeestantaro, studentoj de UvA pri diversaj fakoj, vigle starigis demandojn pri la nuntempa uzo de Esperanto, denaskuloj, eblecoj pri disdialektiĝo, ktp.

Ĉispeca ateliero pri Esperanto okazas ĉe UvA jam por la tria fojo kaj konstateblas la daŭre kreskanta intereso pri la fenomeno Esperanto, ne nur pro la nombro de ĉeestantoj (ĉijare la salono plenplenis), sed ankaŭ pro la videbla preteco science pridiskuti la utiligon de lingvo kia Esperanto.

*Atilio Orellana Rojas*

### 3.3 Pri nacia semiotiko en la komia ĉefurbo

La 4-5-an de Majo 2006 en la ĉefurbo de Komia aŭtonoma Respubliko de Rusia Federacio, Siktivkar, okazis la 3-a internacia scienca lingvistika konferenco organizita de Komia ŝtata pedagogia instituto laŭ la temo "Nacia semiotiko: tekstoj, artefaktoj, interpretoj". Ĝin partoprenis pli ol 60 personoj el 9 landoj ( Rusio, Litovio, Estonio, Hispanio, Finnlando, Pollando, Svedio, Belorusio, Germanio). Prelegon pri la temo "Faktoroj de lingvistika memidentigo en artefaritaj lingvoj" en la konferenco faris la sekretariino de Litova Esperanto-Asocio *Aida Cizikaite*.

*Povilas Jegorovas*

### 3.4 Pri eŭropa lingvo-politiko en Kaunas

La 12-14-an de Majo, 2006 en Kaunas okazis internacia interfaka scienca konferenco organizita de Departamento de Regionaj Studoj de la Instituto pri Politikaj Sciencoj kaj diplomatio de Vytautas Magnus Universitato en Kaunas. La ĉeftemo de la konferenco estis "Lingvo, diverseco kaj integriĝo en vastiĝanta Eŭropa Unio - defioj kaj eblecoj". Krom du plenkunsidoj la konferenco laboris en sep diverstemaj sekcioj (po 2 aŭ 3 samtempe) kaj tri kolokvoj. La konferencon partoprenis pli ol cent personoj el 23 landoj. En la konferenco Esperanto estis dece reprezentita. En la sekcio "Eŭropa Unio kaj lingva diverseco" prelegon faris *Michael Cwik* el Bruselo. Du kolokvojn pri lingva politiko en Eŭropa Unio gvidis kaj mem prelegis *prof. Robert Philipson* el Kopenhago. En tiu-ĉi kolokvo krome prelegis la vicsekretario de Esperanto Radikala Asocio el Italio *Lapo Orlandi*. Li eĉ proponis nome de la konferenco akcepti tiel nomatan Manifeston de Kaunas. Pro neprepariteco al tio kaj de organizantoj kaj de la publiko kaj pro manko de projekto de la dokumento, kompreneble, ĝi ne estis akceptita, sed tio elvokis viglan diskuton. Sendube, tiajn aferojn oni devas anticipi plani kaj antaŭvidi por havi la rezulton. Bedaŭrinde, pro lastmomenta ekmalsano ne povis veni al la konferenco *François Simonnet* el Francio, sed resumo de lia prelego (same kiel de aliaj) estas publikigita en konferenca libro. Prelegon pri temo "Egalrajteco kaj ekonomieco de internacia kunlaboro" faris sekretariino de Litova Esperanto-Asocio *Aida Cizikaite* (tiu-ĉi prelego estis preparita kune kun *prof. Otto Haspra* el Budapeŝto, kiu pro sanproblemoj al la konferenco ne venis). Krome, en la kolokvo prelegon pri lingvaj minoritatoj en Eŭropa Unio faris *prof. Roland Breton* el Francio. Precipe aktiva dum la konferenco estis *Michael Cwik*, kiu faris multajn demandojn kaj komentojn al diversaj prelegantoj. Entute estis legitaj 70 prelegoj kaj raportoj. Resumoj de ĉiuj prelegoj estis publikigitaj en konferenca libro, kiun ricevis ĉiu partopreninto. Krome, poste aperos volumo kun la plenaj tekstoj de la prelegoj. La konferencon partoprenis ankaŭ la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio *Povilas Jegorovas* kaj la estrarano direktoro de Vilnusa teknika kolegio *Algimantas Piliponis*. Litova Esperanto-Asocio iom helpis en organizaj preparlaboroj de la konferenco. Bedaŭrinde, ke pro diversaj kaŭzoj la konferencon ne povis partopreni ankoraŭ kelkaj renomaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj intencis veni al Kaunas kaj sendis resumojn de siaj prelegoj. La ĉefan enkondukan prelegon al la temo dum la unua konferenca plenkunsido faris la elstara fakulo pri lingvo-politiko *Prof. Bernard Spolsky* el Izraelo. Menciindas, ke ĉi-jare en Vilnius en la litova lingvo aperos la fama libro de *Prof. Robert Philipson* "Ĉu nur anglalingva Eŭropo?". Tiu-ĉi libro estis reklamata dum la konferenco.

*Povilas Jegorovas*

### 3.5 Antaŭ studentoj de lingvistiko en Kaunas

Lau invito de estrino de katedro pri regionaj studoj de Kaunas Vytautas Magnus Universitato, *d-ino Ineta Savickiene*, la 16-an de Majo 2006 la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, *Povilas Jegorovas*, por pli ol 50 studentoj de la fakultato pri humanismaj sciencoj dum du akademaj horoj prelegis pri Esperanto, la lingva problemo en Eŭropa Unio kaj rilataj aferoj. La prelego okazis enkadre de la studobjekto "Enkonduko en la ĝeneralan lingvistikon". Fine de la prelego estis multaj demandoj pri diversaj aspektoj de la prelego. Simila kunlaboro kun tiu universitato daŭros ankaŭ estonte.

*Povilas Jegorovas*

### 3.6 Pri retoriko de Ivo Lapenna en la latva Jelgava

La 15-17-an de Junio, 2006 en la urbo Jelgava en Latvio en Latvia Agrikultura Universitato okazis internacia scienca konferenco laŭ ĉefa temo "Novaj dimensioj en evoluo de la socio". Ĝin partoprenis diversaj sciencistoj el Latvio kaj kelkaj apudaj landoj. La konferencon entute partoprenis pli ol 70 personoj, estis legitaj pli ol 40 diversaj raportoj, prelegoj, okazis ronda diskutotablo. La 16-an de Junio raporton en rusa lingvo laŭ la temo "Retoriko de Ivo Lapenna" legis la sekretariino de Litova Esperanto-Asocio *Aida Cizikaite*, kiu nun doktoriĝas en la Kauna humanisma fakultato de la Vilniusa universitato.

*Povilas Jegorovas*

### 3.7 Konferenco en la Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato

La 26-27-an de oktobro 2006 en la ĉefurbo de Ĉuvaŝio (urbo Ĉeboksary, Rusio) egide de la Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato okazos regula scienca konferenco dediĉita al fama ĉuvaŝologo (t.n. Aŝmarinaj legadoj). Post plurfoja prezentado de interlingvistikaj temoj kadre de tiuj simpozioj kaj aparte post sukcesa defendo de habilitacia disertaĵo far la subskribinto ĉe la sama universitato la organiza komitato proponis al mi lanĉi regulan interlingvistikan sekcion kadre de la nomita konferenco.

D-ro Mark Fettes sugestis, ke por la unua kunsidaro estu elektita ia "tegmenta temo", ekz.: "Atingoj kaj prioritatoj post la unua jarcento de moderna interlingvistiko". D-ro Detlev Blanke aldonis: "Universalaj lingvoj inter utopio kaj realeco". Ŝajne ambaŭ temoj kongruas. Do, la sekcio havu kiel "tegmentan temon" ilin kune: "Universalaj lingvoj inter utopio kaj realeco. Atingoj kaj prioritatoj post la unua jarcento de moderna interlingvistiko".

Sed mi supozas, ke por la unua fojo eblus akcepti ajnateman materialon, nur ke ĝi estu sciencnivela kaj interlingvistika. Por la organizantoj ege gravas, ke la sekcio estu vere internacia, tial mi petas ĉiujn interesitajn interlingvistojn pripensi sian partoprenon en la nomita aranĝo. Des pli, ke senpere antaŭ la konferenco en la sama urbo okazos la 11-a Lingva Festivalo, kiun iniciatis kaj ĉiam plu prizorgas lokaj esperantistoj. La aranĝo vere estas partopreninda.

Kelkaj informoj pri la kondicxoj:

1. Aliĝo estas senpaga.
2. Veturbiletoj, loĝado kaj nutrado proprakosta.
3. Oficialaj invitiloj estos senditaj (sed necesas tre frue aliĝi, ĉar burokrataĵoj ĉiam okupas plurajn monatojn).
4. Eblas partopreni la konferencon koresponde (sendinte sian artikolon por la kolekto, kiu

estas presata kiel rezulto de ĉiu el la Aŝmarinaj legadoj; kutime la materialoj aperas en la rusa lingvo jaron post la okazigo de la konferenco).

5. Ĉiuj prelegoj/artikoloj devas esti en Esperanto kaj en la rusa. Eventuale, krome, en alia nacia lingvo, sed tiun detalon ni pridiskutu iom poste, kiam klaros proksimuma kvanto de partoprenuntoj kaj aliaĵoj. La akceptebla amplekso - ĝis 10 paĝoj A4, litertipo Times New Roman 14. La artikolaro estus eldonita de la universitata eldonejo. Kiu ne povas prizorgi sian ruslingvan tekston taŭgan por publikigo, rajtas pagi 10 eŭrojn por la traduko al la konto sciigota al tiuj, kiuj petos. Por ricevi la artikolaron de la tuta konferenco en la rusa lingvo necesus aparte trakti post la libro-apero. Se tio okazus hodiaŭ, verŝajne, necesus pripagi afrankon (depende de la libra pezo - 5-10 eŭrojn).

6. Eblas eldoni ankaŭ E-lingvan material-kolekton de la interlingvistika sekcio, eĉ antaŭ la konferenco (tiel ke ĉiuj partoprenantoj ricevus ĝin eke de la aranĝo mem). Sed tio postulus pagon: 25 eŭrojn por tiuj, kiuj ricevus la artikolaron rekte en Ĉeboksary, aŭ 30 eŭrojn por tiuj, al kiuj necesus sendi ĉi-libron post la konferenco. Ĉiu kontribuinto kaj paginto ricevus 1 aŭtoran ekzempleron kaj rajtus aĉeti pliajn po 10-15 eŭroj depende de la rezultinta libro-amplekso. La artikolaro estus eldonita ĉe iu akademia (universitata aŭ ne, sed nepre akademia) eldonejo, verŝajne, kvanto de 100 ekz., eventuale iom pli).

7. Dum kaj ĉirkaŭ la konferenco eventualas diversaj renkontiĝoj: kun lokaj sciencistoj, studentoj, esperantistoj ktp.

8. La urbo atingebblas per trajno el Moskvo, kiu veturas nokte kaj venas al Ĉeboksary matene.

9. Por ĉiuj pliaj informoj skribu al: d-ro hab. A. Melnikov, [aleks-meln@mail.ru](mailto:aleks-meln@mail.ru). Mia dua ebla retadreso estas: [oduvanchik1999@mail.ru](mailto:oduvanchik1999@mail.ru).

### **3.8 Doktorigo de prof. LIU Haitao**

La 26-an de Majo 2006, *prof. Liu Haitao* sukcese defendis sian doktorigan disertacion (PhD) pri lingvistiko ĝenerale kaj komputa lingvistiko speciale ĉe Komunikada Universitato de Ĉinio en Beijing. La titolo de la disertacio estas "Sintaksa analizo bazita sur dependa rilato". La disertacio proponas novan kadron de sintaksa analizo bazita sur valenta modelo de vorto. La praktika flanko: la disertacio komputile pruvas la teorian kadron uzantan la ĉinan lingvon kiel la objekton de analizado. Laŭ la defenda komitato la disertacio havas gravajn teorian signifon kaj praktikan valoron.

(Vidu prof. LIU dum la defendo: <http://htliu.nease.net/lhtdr06.jpg>)

### **3.9 Diplomdisertaĵo pri la simbola lingvo LoCoS**

Sub interlingvistika vidpunkto interesan diplomdisertacion defendis Marleen Vanhauer en Rostock (norda germanio) :

*Vanhauer, Marleen* (2006); *Overcoming the Language Barrier. Das Potential der internationalen Symbolsprache LoCoS in der Mensch-Maschine-Kommunikation.* Offenbach: Hochschule Offenbach, Fachbereich Medien und Informationswesen; Rostock: Fraunhofer Institut für Graphische Datenverarbeitung, Abteilung Human-Centred Interaction Technologies, 90 p.

(La manuskripto haveblas ĉe la aŭtorino: [marleen@vanhauer.de](mailto:marleen@vanhauer.de), [marvan76010@yahoo.de](mailto:marvan76010@yahoo.de) )

## 4 Honorigoj por interlingvistoj

### 4.1 Hans-Jürgen Mattusch 75-jara: interlingvistika bibliografio

La slavisto docento d-ro habil. Hans-Jürgen Mattusch (foje Max Hans-Jürgen) el Düsseldorf (antaŭ 1990 en Halle/GDR) fariĝis 75-jara la 16-an de majo 2006.

Li studis en la universitatoj Jena, Halle-Wittenberg, Moskvo kaj Sofia.

Liaj laborkampoj i.a. estis teorio de komunikado, tekstlingvistiko, faklingva komunikado kaj planlingvoj.

De 1984-1990 li gvidis la scienco-kampon slavaj lingvoj en la Instituto por Fremdlingvoj de la Universitato Halle-Wittenberg.

D-ro Mattusch partoprenis per prelegoj en kelkaj interlingvistikaj kolokvoj en Ahrenshoop (GDR, ĉe Balta Maro) kaj kune kun sia edzino Edeltraud Mattusch organizis Esperanto-kursojn en la universitato Halle. Manuskripto por universitata lernolibro de Esperanto, ellaborita kun d-rino Sabine Fiedler (vidu en la bibliografio) ne plu povis aperi pro la politikaj ŝanĝoj en GDR post 1989. De 1991-1993 d-ro Hans-Jürgen Mattusch apartenis al la unua estraro de Gesellschaft für Interlinguistik (GIL).

#### Honore al li ni publikigas la bibliografion de lia interlingvistikaj publikaĵoj:

*Mattusch, Hans-Jürgen* (1988a): 4.-6.Seminar für Interlinguistik 1982, 1983, 1984, in Ahrenshoop/DDR. In: *Wiss. Zeitschrift der Universität Halle*, XXXVII, Gesellschaftswiss. Reihe, Nr. 2, p.114-117.

-- (1988b): Pri projekto de internacia altlerneja Esperanto-lernolibro "Fiedler-Mattusch: Esperanto - Internacia lernolibro por studentoj kaj sciencistoj". En: *Internacia Pedagogia Revuo* 18, Nr. 4, p. 18

-- (1989): Sprachplanung, Plansprachen und Fachsprachen. En: *Wiss. Zeitschrift der Martin-Luther-Univ. Halle-Wittenberg*, XXXVIII, Gesellschaftswiss. Reihe, Nr.5, p. 85-88.

-- (1991): Interlinguistik und Plansprachen. En: *Wiss. Zeitschrift der Martin-Luther-Univ. Halle-Wittenberg*, XL, Gesellschaftswiss. Reihe, Nr. 5, p. 27-30.

-- (1993): Zur Sprachgrenzenüberschreitung im Europa von morgen. En: *Konferenz zu aktuellen Problemen der Fremdsprachenlehr- und -lernforschung. Diskussionen - Meinungen - Arbeitsergebnisse*. Nr. 1. Halle: Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg, FB Sprach- und Literaturwissenschaft, p. 50-55.

-- (1999): Vielsprachigkeit - Fluch oder Segen für die Menschheit? Frankfurt/ Main u.a.: Peter Lang, 321 p.

-- (2001a): Globalisierung und europäischer Fremdsprachenunterricht. En: Fiedler, Sabine/Liu, Haitao (Hrsg.)(2001): *Interlingvistikaj Studoj. Interlinguistische Studien. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice: KAVA-PECH, p. 77-94.

-- (2001b): Sprachenvielfalt – Fluch oder Segen? En: Blanke, Detlev (Hrsg.): *Sprachenpolitik in Europa. Beiträge einer Veranstaltung des „Vereins zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V.“ (VFsS) und der „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (GIL) am 13. November sowie der 9. Jahrestagung der GIL, 12.-14. November 1999, in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 6*, p.16-29.

-- kun Sabine Fiedler (1990a): Grundkurs Esperanto Teil 1. Lehrmaterial Nr. 73. Halle: Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg. Sektion Fremdsprachen. Arbeitsbereich Fachsprachliche Aus- und Weiterbildung. 64 p.

-- kun Sabine Fiedler (1990b): Grundkurs Esperanto Teil 2. Lehrmaterial Nr. 73. Halle: Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg. Sektion Fremdsprachen. Arbeitsbereich Fachsprachliche Aus- und Weiterbildung. 59 p.

-- kun Edeltraud Mattusch (2002): Esperanto - ein Ausweg aus Babylon? 95 Jahre Esperanto in Düsseldorf. Niebüll: Videel OHG, 205 p.

*Detlev Blanke*

## **4.2 Otto Back 80-jara: interlingvistika bibliografio**

La 28-an de Marto 2006 profesoro d-ro Otto Back el Vieno 80-jariĝis.

Okaze de lia 70-jariĝo aperis honore al li festlibro, i.a.ankaŭ kun interlingvistikaj kontribuoj de Alicja Sakaguchi, Detlev Blanke, Heiner Eichler kaj Viktor Petioki. (kp. IpI 18/18, p. 19)

Otto Back studis en Vieno romanajn kaj slavajn lingvojn kaj specialiĝis pri onomastiko, germana ortografio, lingvo-planado kaj interlingvistiko. Ekde 1983 li estas honoraria profesoro pri grafematiko ĉe la Universitato de Vieno. Li apartenas al kelkaj gravaj sciencaj komitatoj, i.a. al „Ständiger Ausschuss für geographische Namen“ (Konstanta komitato pri geografiaj nomoj, Frankfurt/Main) kaj al „Österreichische Orthographie-Kommission“ (Aŭstria ortografia komisiono)

Per la kompilo de elekta bibliografio kun speciala atento al interlingvistiko, ni volas omaĝi al la jubileinto.

### I Monografioj kaj antologioj ekster interlingvistiko

Back, Otto (1979): Zur Klein- und Großschreibung im Deutschen: Probleme und Standpunkte. Wien: Österreichischer Bundesverlag, 101 S.

-- (1983, 1991, 2002): Übersetzbare Eigennamen. Eine synchronische Untersuchung von interlingualer Allonymie und Exonymie. 1. Aufl. Salzburg, 2. Aufl. Klagenfurt: Österreichische Gesellschaft für Namensforschung (= Reihe „Österreichische Namensforschung“, Sonderreihe 5) 1983 (130 S.) bzw. 1991 (131 S.); 3. revidierte u. erweiterte Aufl. Wien: Edition Praesens 2002 (153 S.).

-- (2006): Buchstäblich geschrieben. Aufsätze über Schrifttheorie, Orthographie und Transkription. Wien: Praesens Verlag, 156 S.

### II Pri interlingvistiko en revuoj kaj antologioj

Back, Otto (1972): Was an Fremdsprachen schwierig ist. En: Moderne Sprachen 16, Nr.1/2: 6-26. (kvankam ne interlingvistika tamen grava por interlingvistikaj studoj.)

-- (1979): Über Systemgüte, Funktionsadäquatheit und Schwierigkeit in Plansprachen und ethnischen Sprachen. En: Felber, Helmut/Lang, Friedrich/ Wersig, Gernot (Hrsg.)(1979): Terminologie als angewandte Sprachwissenschaft. Gedenkschrift für Univ.-Prof. Dr. Eugen Wüster. München: Saur, S. 257-272.

-- (1980): Pri planlingva etimologio. En: Szerdahelyi, István (Hrsg.)(1980): Miscellanea interlinguistica. Budapest: Tankönyvkiadó, S. 266-278.

- (1990): Plansprachen in der Donaumonarchie. En: Spillner, Bernd (Hrsg.) (1990): Sprache und Politik. Kongreßbeiträge zur 19. Jahrestagung der Gesellschaft für Angewandte Linguistik GAL e.V. (Forum Angewandte Linguistik Band 18). Frankfurt/Main u.a.: Peter Lang, S. 57-69.
- (1992): Sprachen-Erfinden in der Donaumonarchie (1821-1918). En: Österreich in Geschichte und Literatur 36, Nr. 3, S. 149-162.
- (1994): Demandoj pri la scienca statuso de planlingvaj temoj. En: Maitzen, Hans Michael/Mayer, Herbert/Tišljar, Zlatko (Hrsg.)(1994): Aktoj de Internacia Scienca Simpozio „Esperanto 100-jara“. Universitato de Vieno, 28.-30.10.1987. Wien: Pro Esperanto/Maribor: Interkulturo, S. 133-136.
- (1996a): Plansprachen. En: Goebel, Hans/Nelde, Peter H./Starý, Zdeněk/Wölck, Wolfgang (Hrsg.)(1996): Kontaktlinguistik, Contact Linguistics. Linguistique de contact. HSK 12.1., Vol.1, Berlin-New York: de Gruyter, p. 881-887.
- (1996b): A matter for Interlingua. En: Interlinguistische Informationen 5, 2(20), p. 4-5 (Recenzo pri : Peter F. Gopsill, 1990: International Languages. A matter for Interlingua. Sheffield: British Interlingua Society).
- (1996c): Vom Übersetzen der Eigennamen in Plansprachen und Ethnosprachen. En: Becker, Ulrich (Hrsg.)(1996): Translation in Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, November 1995, in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 1. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 58-60.
- (1998): La unua teksto en Occidental. En: Menade bal püki bal. Festschrift zum 50. Geburtstag von Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Edition Iltis, p. 369-374.
- (1999): Interlinguistik. En: Ernst, Peter (Hrsg.)(1999): Einführung in die synchrone Sprachwissenschaft. Wien: Edition Praesens, p. 18-18 bis 18-19.
- (2001a): Occidental und seine strukturellen Besonderheiten. En: Blanke, Detlev (Hrsg.)(2001): Zur Struktur von Plansprachen. Beiträge der 10. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 17.-19. November 2000 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 7. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 48-59.
- (2001b): Esperanto-Spuren im Occidental. En: Fiedler, Sabine/Liu, Haitao (Hrsg.)(2001): Interlingvistikaj Studoj. Interlinguistische Studien. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Dobřichovice: KAVA-PECH, p. 420-432.
- (2002): Zur gegenwärtigen Lage des Occidental (Interlingue). En: Blanke, Detlev (Hrsg.)(2002): Plansprachen und ihre Gemeinschaften. Beiträge der 11. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2001 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 8. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 27-30.
- (2003a): Zur Esperanto-Wiedergabe lateinischer und griechischer Eigennamen in Wüsters Enzyklopädischem Wörterbuch. En: Blanke, Detlev (Hrsg.)(2003): ProCom'98. Sektion 3 „Terminologiewissenschaft und Plansprachen“. Beiträge der Internationalen Konferenz „Professional Communication and Knowledge Transfer“ (Wien, 24-26 August 1998). Interlinguistische Informationen. Beiheft 10. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V. p.

-- (2003b): Erfundene Sprachen. En: Seipelt, Wilfried (Hrsg.)(2004): Der Turmbau zu Babel. Ursprung und Vielfalt von Sprache und Schrift (Ausstellungskatalog, Kunsthistorisches Museum Wien. Kulturhauptstadt Graz 2003). Band II, S. 267, 268, 271. (Dazu Exponatbeschreibungen p. 336, 338, 341, 344, 345.)

-- (2004): Lingvo-inventado en la Danuba monarkio (1821-1918). En: Hauptenthal, Irmi/Hauptenthal, Reinhard (Hrsg.)(2004): Esperante kaj Ekumene. Fest-libro por la 75a naskiĝtago de Adolf Burkhardt 1929 - 10 aprilo – 2004. Schliengen: Edition Iltis, p. 213-238 (Traduko de Back 1992, farita de Reinhard Hauptenthal).

-- (2005a): Lingvo-inventado en la Danuba monarkio (1821-1918). El la germana tradukis Reinhard Hauptenthal. Schliengen: Edition Iltis, 39 p. (Sonderdruck von Back 2004).

-- (2005b): Babylonische Türme. Plansprachen in ihren Beziehungen untereinander und im Verhältnis zu ethnischen Sprachen. En: Blanke, Detlev (Hrsg.)(2005): Internationale Plansprachen – Entwicklung und Vergleich. Beiträge der 14. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 5.-7. November 2004 in Berlin. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 22-31.

*Detlev Blanke*

### 4.3 „Speciala Premio Eugen Wüster“ por Wera kaj Detlev Blanke

La 30-an de majo 2006 la Internacia Informcentro pri Terminologio en Vieno (Infoterm), fondita en la jaro 1971 de Eugen Wüster, distingis Wera kaj Detlev Blanke per la „Speciala Premio Eugen Wüster“ (germane: Eugen Wüster Sonderpreis) aprezante iliajn "senlacajn klopodojn kaj eksterordinarajn rezultojn sur la kampo de terminologio". La premio estas subtenata de la urbo Vieno (inkl. la universitato kaj la Nacia Biblioteko kun IEMW) kaj de la Aŭstria UNESCO-Komisiono. La geedza paro Blanke per publicaĵoj kaj prelegoj aparte atentigis pri la planlingvaj radikoj de la terminologio-scienca kaj klopodis kontribui al la organizado de terminologia agado en Esperanto.

## 5 **Grandega perdo por la rumana movado: Forpasis prof-ro d-ro Constantin Dominte (1944-2006)**

*Ignat Florian Bociort*

La 29-an de aprilo 2006 en Bukareŝto forpasis *prof. D-ro Constantin Dominte*.

Kiam li, antaŭ pli ol unu jaro, sendis al mi, neatendite, longan liston de sia granda scienca agado (studoj, artikoloj, prelegoj en- kaj eksterlande) kaj ampleksan informon pri siaj publikaĵoj, apogantaj la ideon de Eo en pluraj rumanaj fakaj revuoj aŭ ĵurnaloj kaj pri siaj organizaj poresperantaj agadoj, mi ankoraŭ ne estis sciinta pri la nekuracebla malsano kaj ne komprenis, ke li fakte liveris al mi kvazaŭ adiaŭan materialon, necesan por eventualaj postaj konsideroj. Kvankam konscia pri sia ne malproksima forpaso, li daŭre laboris, akceptante la destinon kun filozofia, Sokrata kvieto. Eĉ sian E-lingvan nekrologon li mem verkis.

Ege inteligenta kaj diligenta lernanto en eta urbo provinca, li eksciis en 1958 pri Eo kaj lernis ĝin ; poste, kiel studento en Bukareŝto, li profundigis siajn lingvajn konojn en neoficialaj kursoj de Boldan kaj Welther en la Politekniko.

Dominte finstudis Filologion kiel “ĉefo de la promocio” (t.e. kun la plej altaj notoj inter siaj

gekolegoj), iĝis asistanto kaj post kelkaj jaroj estis eble la plej konata kaj ŝatata lingvisto de la juna generacio. Liaj studoj pri la rumana lingvo (fonetiko, morfologio, leksiko, stilistiko, etimologio), pri lingva teorio, pri speciala interlingvistiko montris liajn altan instruitecon kaj larĝan fakon horizonton. Kelkaj liaj studoj aperis ankaŭ eksterlande (en Belgio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Greklando, Hungario, Italio, Usono) en ses lingvoj kaj en Eo. Pluraj recenzoj, komentoj, diskutoj ktp. verkitaj de Dominte aperis en rumanaj kaj eksterlandaj (E-lingvaj) periodaĵoj.

Dum la periodo de oficiala malpermeso de Eo en Rumanio, nur du universitatoj, alte kvalifikitaj lingvistoj - prof-ro Vraciu en Iași kaj prof-ro Dominte en Bukureŝto - havis la kuraĝon apogi la ideon de Eo, spite al negativaj sintenoj de kelkaj gravaj lingvistoj pri la “artefaritaj lingvoj”. Post 1970, kiam en Timișoara komenciĝis la firma kaj longa batalo por re-oficialigi nian movadon en Rumanio, Dominte komencis, ĉar nun raitis, aperigi artikolojn kaj studoj pri la internacia lingvo en fakaj revuoj kaj diversaj ĵurnaloj ; samtempe li malfermis E-kurson en Filologia Fakultato de Bukareŝto. Prenis sur sin la ŝarĝon de Scienca Sekretario de la Kolektivo Eo kaj Interlingvistiko (KEI) aperinta en Timișoara (1978), kadre de la Akademie pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj de Rumanio. Lia persona prestiĝo multe helpis al disvastigo de Eo en sciencajn kaj akademian rondojn (la prof-ro Eugen Simion, Prezidanto de la Rumana Akademie de Sciencoj, helpis al li, aperigis siajn kontribuojn en prestiĝa periodaĵo ktp.).

Dominte, kune kun kelkaj siaj ge-kolegoj kaj -studentoj, aperigis la du-voluman *Vortaron Eo-Rumana kaj Rumana-Eo*, entenantan ankaŭ kompendion pri Eo-gramatiko. Poste, de 2001-2005, li aperigis (en la revuo ES-TO) ampleksan E-kurson, kiu superas la lernilojn, urĝe, en rekorda tempo, verkitajn (tuj post la estigo de KEI) en Timișoara, kun helpo de pluraj gestudentoj, sub premo de la timo, ke la tuta E-agado estos baldaŭ de nove malpermesata, kio eĉ okazis.

Vere talentita poeto (kun oficiala atestilo kiel tradukisto) Dominte esperantigis *multajn* rumanajn poeziaĵojn, precipe de M. Eminescu; poste oni eldonis tiujn tradukojn en la unuaj rumanaj kolektoj esperanto-lingvaj. Li kaj alia talenta tradukisto, I. Nagy, iniciatis aperigon de du-lingvaj antologioj, Eo-hungara kaj Eo-rumana.

Modesta, helpema, ekzemplo de sindono kaj diligenteco, Dominte spontane gajnis la korojn kaj animojn de la homoj lin konintaj.

Posta forpaso de *Vraciu*, *Apreotesei* kaj *Boja* la forpaso de *Dominte* estas por la rumana movado ege doloriga perdo, longtempe neanstaŭebla.

Jen malgranda elekto de liaj interlingvistikaj publikaĵoj (kompilita de Detlev Blanke):

*Dominte, Constantin* (1978): Recenzo pri: Magomet Isaev (1978, Red.): Problemy interlingvistiki. Moskva: Nauka. En: Studii ŝi cercetări lingvistice. București, XXIX, Nr. 3, p. 360-362.

-- kun Jenel Marin (1980a, Red.): Dicționar Esperanto-Român. Cu un compendiu de fonetică, lexic ŝi gramatică Esperanto. Partea a I. București: Universitatea din București, 385 p.

-- kun Jenel Marin (1980b, Red.): Dicționar Român-Esperanto. Cu un compendiu de fonetică, lexic ŝi gramatică Esperanto. Partea a II, București: Universitatea din București, 221 p.

-- (1985): Precursori din românia ai planificării lingvistice ŝi ai limbilor construite. En: Analele Universității București. Limba ŝi literatura română. București, p. 65-70.



-- (1992): „Miorița“ în Esperanto. En: Miorița. Revistă de cultură folclorică cîmpulung. Bucovina, II, Nr. 1(3), p. 29-34.

-- (1993a): Vorgänger der linguistischen Planung und der künstlichen Sprachen in Rumänien. En: Revue Romaine de linguistique XXXVIII, Nr. 1-3, p. 109-116 (germana versio de Dominte 1985).

-- (1993b): Despre câteva probleme de interlingvistică André Martinet. En: Studii și cercetări lingvistice XLIV, Nr. 6, p. 511-516 (partoj el la intervjuo, kiun faris F. Lo Jacomo kaj D. Blanke kun André Martinet).

-- (2001): Fonemstatistikaj rimarkoj pri Esperanto. En: Fiedler, Sabine/ Liu, Haitao (2001. Eld.): Studoj pri interlingvistiko. Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Dobřichovice: KAVA-PECH, p. 337-345.

-- (2002): Studii despre interlingvistică. (Recenzo pri: Fiedler, Sabine /LIU, Haitao (2001). Studoj pri interlingvistiko) En: Caiete critice 1-2 (171-172), p. 145-149.

-- kun Iosif Nagy (2004): Interlingvistiko kaj esperantologio en Rumanio. En : Haupenthal, Irmi/ Haupenthal, Reinhard (Eld.): Esperante kaj Ekumene. Fest-libro por la 75a naskiĝ-tago de Adolf Burkhardt. Schliengen: Edition Iltis, p. 255-276. (en ĉi tiu eseo oni trovas pliajn registrojn de eseoj kaj aliajn verkojn de Constantin Dominte).

## **6 „Interlinguistische Beiträge“ de Detlev Blanke**

### **6.1 Recenzo de Věra Barandovská-Frank**

*Blanke, Detlev (2006): Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen Herausgegeben von Sabine Fiedler. Frankfurt/Main, Berlin, Bern, Bruxelles, New York, Oxford, Wien: Europäischer Verlag der Wissenschaften Peter Lang, 405 p. ISBN 3-631-55024-3, prez : 56,50 EUR.*

(Interlingvistikaj kontribuoj. Pri la karaktero kaj funkcio de internaciaj planlingvoj. Editorita de Sabine Fiedler)

En la eldonejo Peter Lang aperis en 1998 „Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden”, de Alicja Sakaguchi, verko severe scienca, kiu fake prezentas kaj dokumentas interlingvistikon. La leginto ricevis pravan impreson, ke interlingvistiko estas scienco, kaj malpli pravan impreson, ke ĝi estas scienco rigora kaj komplika. Nun aperas, sameldoneje, „Interlinguistische Beiträge“ de D. Blanke, kiu alportas neniujn renversige novajn informojn, tamen prezentas la faktojn tiel, ke oni opinias interlingvistikon komprenebla, eble eĉ interesa. Tio neniom signifas, ke tiu ĉi libro malaltigas la nivelon de la fako, male ĝi helpas al ties prestiĝo.

Detlev Blanke estas en interlingvistikaj rondoj konata klasikulo. Jam 1985 aperis lia ĝis nun uzata kaj citata monografio „Internationale Plansprachen“, kiu kontribuis al la stabiligo de interlingvistiko kiel scienco. Siatempa unikaĵo estis la habilitiĝo de Blanke pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato (Berlin), kie li ekde 1988 instruas. Liaj profesiaj spertoj subtenas ankaŭ la de li fonditan kaj prezidatan organizaĵon „Gesellschaft für Interlinguistik“. Li kunlaboras kun pluraj internaciaj organizaĵoj. El nekredebla kvanto (ĉ. 1600) de liaj publikaĵoj, multaj estas en kaj pri Esperanto, objekto de memstara interlingvistika subfako esperantologio. La prezentata libro tamen kovras pli vastan interlingvistikan kampon.

Ĝi enhavas *selekton de 14 germanlingvaj artikoloj*, antaŭe publikigitajn en diversaj revuoj, kiujn la aŭtoro aktualigis kaj ree prilaboris por tiu ĉi eldono. La libro estas dividita en kvar partojn: (I) Interlingvistiko kaj planlingvoj, (II) Scienchistoriaj aspektoj de interlingvistiko, (IV) Leksikologio kaj leksikografio de planlingvoj, (V) Translatsciencaj aspektoj de planlingvoj.

Tiu ĉi metodike taŭga divido ebligas ankaŭ al nefakulo paŝon post paŝo interkonatiĝi kun la ĉefaj kampoj de interlingvistika agado. Oni konatiĝas kun termino kaj objekto de *interlingvistiko*: kvankam la termino origine rilatis al internaciaj helplingvoj, ekzistas diversaj, foje konfuzigaj interpretadoj. Tial malfacilas orientiĝo por ĉiu, kiu volas enkonduke objekte informiĝi pri la afero. Blanke sagace simple eliras el la morfemstrukturo de la vorto mem: *interlingua* + *istiko* okupiĝas pri interlingvoj, *inter* + *lingv* + *istiko* pri rilatoj inter lingvoj. Tio ebligas al li koncentri la aron de aliroj al kvar grandaj grupoj, kiujn li poste koncize ĥarakterizas: (1) scienco pri internaciaj helplingvoj (2) scienco pri internacia lingva komunikado (3) kontrasta lingvistiko, lingvistiko de plurlingveco (4) scienca okupiĝo pri planlingvoj Interlingue kaj Interlingua.

La titolo de la dua artikolo “Pri la antikvaj lingvoj kaj la problemoj de monda helplingvo” promesas iomete pli, ol tiu enhavas, ĉar krom nelonga informo pri la greka lingvo temas ĉefe pri la latina kaj ties derivaĵoj. La materialo estas bone dividita, aktuale dokumentita kaj liveras solidan bazan superrigardon.

La sekva artikolo “*De projekto al lingvo*” estas klasika enkondukita teksto, klariganta aspektojn, motivojn, funkcion, postulojn kaj klasigon de planlingvoj. Sekvas la fama “Blankea teoremo” pri divido laŭ la sociologia aspekto al *planlingvaj projektoj*, *semiplanlingvoj* kaj *planlingvoj*. Tra la severa 28 ŝtupa kribriĵo povas en la lastan kategorion kompreneble fali nur Esperanto. Unuflanke nekontesteblas la fakto, ke Esperanto ne havas samamplekse uzatan konkuranton: laŭ miaj spertoj estas idistoj agrabla internacia grupo sen grandaj ambicioj, volapukistoj konsideras sin pacamaj lingvohobianoj kaj interlingua-istoj ruze kaŝas informojn pri la kvanto de lingvouzantoj per la indiko, ke Interlingua estas senpere komprenata de milionoj da latinid-parolantoj. Aliflanke, la aliro de Blanke estas klare pragmatika: kiu interesiĝas pri planlingvoj, tiu ne perdu tempon per projektoj kaj tuj koncentriĝu al la esenco. La en la artikolo menciita divido de Sakaguchi al realiĝintaj kaj nerealiĝintaj lingvoj tamen estus iom pli kuraĝiga por potencialaj projektemuloj kaj semiplanlingvemuloj, kvankam ĝi, kiel prave dirite, finas per la sama rezulto.

La plej utila artikolo en la libro estas la represigo de “*Vojoj al fakliteraturo*”. Antaŭ Blanke, ŝajne neniu havis ideon listigi fontojn, necesajn por serioza esploro sur la interlingvistika kaj najbaraj terenoj. La ŝajne rapida vojo “tragoogli” sin en interreto per rezultaj 17.100 indikoj ja ne estas la plej malkomplika nek fidinda, tial estas bone scii pri aliaj serĉebloj.

La dua parto de la libro informas, reprezente, *pri tri pioniroj de interlingvistiko*: *Wilhelm Ostwald* engaĝiĝis ne nur por Ido, sed interesiĝis ĝenerale pri ĉiuj kulturaj, sciencaj kaj politikaj aktivecoj enkadre de sia teorio de energetiko kaj la energia imperativo. Al *Eugen Wüster* ni dankas por la enkonduko de terminoj “planlingvo” kaj “esperantologio” kaj por ampleksa terminologia kaj leksikografia laboro. *Ernst Beermann* estis unu el multaj aŭtoroj de latinidoj, krome li skribis teoriajn verkojn pri mondlingvo<sup>10</sup> kaj analizis Volapukon.

La tria parto enprofundiĝas en *leksikologion kaj leksikografion de planlingvoj*, komencante per komparo de Volapük, Esperanto kaj Interlingua. Per la komparo videble

---

<sup>10</sup> Fakte li prezentis du projektojn: Novilatiin kaj Novilatin (rimarku la diferencon- Red.)

montriĝas, ke el la vidpunkto de aposterioreco Volapük reprezentas la sintezan ekstremon, Interlingua la malan, latinide naturalisman ekstremon, dum Esperanto posedas kaj sintezajn, kaj analizajn trajtojn. Sekvantaj tri artikoloj pritraktas, post enkonduka kuntekstigo, leksikajn specifajojn, faklingvan aplikeblon kaj leksikografion kun aparta konsidero de Esperanto.

Ankaŭ la kvara parto pri *translatado ĉe planlingvoj* specialiĝas pri Esperanto kiel objekto de tradukado kaj interpretado, finante per artikolo pri Zamenhofo kiel tradukisto. Finis coronat opus – la fina listo de elektitaj publikaĵoj de la aŭtoro el la jaroj 2001-2005 okupas ok dense presitajn paĝojn kaj esperigas, ke li plu interlingvistike fekundos.

Rimarko: Se oni, leginte ĉi recenzon, opinias, ke temas pri omaĝo al kadukulo, oni malpravas. Detlev Blanke iĝis ĉi maje nur 65-jara.

## 6.2 Enhavtabelo de la libro „Interlinguistische Beiträge“

### I-a parto Interlinguistik und Plansprachen (*Interlingvistiko kaj planlingvoj*)

- 1 Zum Gegenstand der Interlinguistik (*Pri la objekto de interlingvistiko*)
  - 1.1 Zum Terminus ‚Interlinguistik‘ (*Pri la termino interlingvistiko*)
  - 1.2 Über den Gegenstand der Interlinguistik (*Pri la objekto de interlingvistiko*)
  - 1.3 Plansprachen (*Planlingvoj*)
  - 1.4 Interlinguistik und Esperantologie (*Interlingvistiko kaj esperantologio*)
- 2 Die alten Sprachen und das Problem einer Welthilfssprache (*Pri la antikvaj lingvoj kaj la problemo de monda helplingvo*)
  - 2.1 Latein als internationale Sprache (*Latino kiel internacia lingvo*)
  - 2.2 Andere alte Sprachen als Mittel internationaler Kommunikation (*Aliaj antikvaj lingvoj kiel internaciaj komunikiloj*)
  - 2.3 Modernisierung und Vereinfachung alter Sprachen (*Modernigo kaj simpligo de antikvaj lingvoj*)
  - 2.4 Latinide Plansprachen (*Latinidevenaj planlingvoj*)
  - 2.5 Lateinische Elemente in der Lexik des Esperanto (*Latinaj elementoj en la leksiko de Esperanto*)
- 3 Vom Entwurf zur Sprache (*De projekto al lingvo*)
  - 3.1 Zum Sinn der Plansprachenforschung (*Pri la signifo de esploroj pri planlingvoj*)
  - 3.2 Motive für die Schaffung von internationalen Plansprachen (*Motivoj por krei internaciajn planlingvojn*)
  - 3.3 Sprachprojekt oder Sprache? (*Lingvo-projekto aŭ lingvo?*)
  - 3.4 Plansprachen heute (*Planlingvoj nuntempe*)
  - 3.5 Gründe für den relativen Erfolg des Esperanto (*Kaŭzoj de la relativa sukceso de Esperanto*)
- 4 Interlinguistik und Esperantologie: Wege zur Fachliteratur (*Interlingvistiko kaj Esperantologio: Vojoj al la faka literaturo*)
  - 4.1 Interlinguistik, Plansprachen, Esperantologie (*Interlingvistiko, planlingvoj, esperantologio*)
  - 4.2 Monographien, Sammelbände und Konferenzakten (*Monografioj, antologioj kaj konferencaktoj*)

- 4.3 Hochschulschriften und Hochschullehrbücher (*Altlernejaj disertacioj kaj instrulibroj*)
- 4.4 Periodika zur Interlinguistik und Esperantologie (*Periodaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio*)
- 4.5 Bibliographien (*Bibliografioj*)
- 4.6 Plansprachliche Bibliotheken und Archive (*Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj*)
- 4.7 Interlinguistik in elektronischen Medien (*Interlingvistiko en elektronikaj komunikaj medioj*)
- 4.8 Registrierung von Interlinguisten und Esperantologen (*Registro de interlingvistoj kaj esperantologoj*)

## **II-a parto      Wissenschaftshistorische Aspekte der Interlinguistik (*Scienchistoriaj aspektoj de interlingvistiko*)**

- 5**      Wilhelm Ostwald, Ido und die Interlinguistik (*Wilhelm Ostwald, Ido kaj interlingvistiko*)
  - 5.1 Ido
  - 5.2 Ostwalds interlinguistisches Denken und Handeln (*La interlingvistikaj konceptoj kaj agadoj de Ostwald*)
  - 5.3 Kritische Würdigung der Auffassungen und Bemühungen Ostwalds (*Kritika prezado de la interlingvistikaj konceptoj kaj klopodoj de Ostwald*)
- 6**      Zur Plansprache Esperanto und zur Esperantologie im Werk von Eugen Wüster (*Pri la planlingvo Esperanto kaj esperantologio en la verkaro de Eugen Wüster*)
  - 6.1 Plansprachen an der Wiege der Terminologiewissenschaft (*Planlingvoj ĉe la lulilo de la terminologio-scienco*)
  - 6.2 Die Termini ‚Plansprache‘ und ‚Esperantologie‘ (*La terminoj ‚planlingvo‘ kaj ‚esperantologio‘*)
  - 6.3 Der Esperantologe (*La esperantologo*)
  - 6.4 Das Enzyklopädische Wörterbuch Esperanto-Deutsch (EV) (*La Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana*)
- 7**      Ernst Beermann - seine interlinguistischen Ansichten und neulateinischen Plansprachenprojekte (*Ernst Beermann - liaj interlingvistikaj konceptoj kaj novlatinaj planlingvaj projektoj*)
  - 7.1 Über Leben und Werk von Ernst Beermann (*Pri la vivo kaj verko de Ernst Beermann*)
  - 7.2 Ernst Beermanns Veröffentlichungen zur Frage einer Weltsprache (*La publikaĵoj de Ernst Beermann pri la problemo de mondlingvo*)
  - 7.3 Ernst Beermanns interlinguistische Prinzipien (*La interlingvistikaj principoj de Ernst Beermann*)
  - 7.4 Novilatiin und Novilatin (*Novilatiin kaj Novilatin*)
  - 7.5 Texte in Novilatiin und Novilatin im Vergleich zu einigen Ethnosprachen und Plansprachen (*Tekstoj en Novilatiin kaj Novilatin, kompare al kelkaj etnaj lingvoj kaj planlingvoj*)

## **III-a parto      Lexikologie und Lexikographie von Plansprachen (*Leksikologio kaj leksikografio de planlingvoj*)**

- 8**      Zur Morphologie von Volapük, Esperanto und Interlingua - ein Vergleich (*Pri la morfologio de Volapuko, Esperanto kaj Interlingua - komparo*)
  - 8.1 Volapük, Esperanto, Interlingua (*Volapuko, Esperanto, Interlingua*)
  - 8.2 Herkunft der Morpheme (*Deveno de la morfemoj*)

- 8.3 Wortbildung (*Vortfarado*)
- 8.4 Grammatische Kategorien und Paradigmen (*Gramatikaj kategorioj kaj paradigmoj*)
- 8.5 Linguistische Bedeutung (*Lingvistika signifo*)
- 8.6 Texte (*Tekstoj*)
  
- 9** Wortschatzbesonderheiten in Plansprachen - unter spezieller Berücksichtigung des Esperanto  
(*Leksikaj specifajoj en planlingvoj - kun aparta konsidero de Esperanto*)
  
- 9.1 Einige Plansprachentypen (*Kelkaj planlingvaj tipoj*)
- 9.2 Das Esperanto (*Esperanto*)
- 9.3 Einige Einflüsse auf die lexikalische Entwicklung (*Kelkaj influoj al la evoluo de la leksiko*)
  
- 10** Plansprachen als Fachsprachen - unter besonderer Berücksichtigung des Esperanto  
(*Planlingvoj kiel faklingvoj - kun aparta konsidero de Esperanto*)
  
- 10.1 Plansprachen - Sprachplanung - Fachsprachen (*Planlingvoj - lingvo-planado - faklingvoj*)
- 10.2 Fachsprachliche Verwendung einiger Plansprachen (*Faklingva apliko de kelkaj planlingvoj*)
- 10.3 Esperanto
- 10.4 Plansprachliche Impulse für die Terminologiewissenschaft (*Planlingvaj impulsoj por la terminologio-scienco*)
  
- 11** Zweisprachige Lexikographie mit Esperanto - unter besonderer Berücksichtigung des Deutschen  
(*Dulingva leksikografio kun Esperanto - kun aparta konsidero de la germana lingvo*)
  
- 11.1 Lexikographie und Esperanto (*Leksikografio kaj Esperanto*)
- 11.2 Wörterbücher für Esperanto - Übersicht (*Vortaroj por Esperanto - superrigardo*)
- 11.3 Wörterbücher Esperanto-Deutsch (*Vortaroj Esperanto-Germana*)
- 11.4 Wörterbücher Deutsch-Esperanto (*Vortaroj Germana-Esperanto*)
- 11.5 Einbändige Wörterbücher Esperanto-Deutsch/Deutsch-Esperanto (*Unuvolumaj vortaroj Esperanto-Germana/Germana-Esperanto*)
- 11.6 Das Bildwörterbuch (*La Bildvortaro*)
- 11.7 Wortlisten in Lehrwerken (*Vortlistoj en lernolibroj*)
- 11.8 Esperanto-Fachwörterbücher mit Deutsch (*Esperantaj fakvortaroj kun la germana lingvo*)
- 11.9 Abschlussbemerkungen (*Finaj rimarkoj*)
  
- IV** **Translationswissenschaftliche Aspekte von Plansprachen** (*Translat<sup>11</sup>-sciencaj aspektoj de planlingvoj*)
  
- 12** Translation bei Plansprachen (*Translatado ĉe planlingvoj*)
  
- 12.1 Einführung (*Enkonduko*)
- 12.2 Einige Besonderheiten des Esperanto in Bezug auf Translation (*Kelkaj specifajoj de Esperanto lige al translatado*)
- 12.3 Übersetzungen (*Tradukado*)
- 12.4 Dolmetschen in/aus Esperanto (*Interpretado en/el Esperanto [n]*)
- 12.5 Ausblick (*Perspektivo*)

---

<sup>11</sup> La radiko ‚translat-‘ laŭ mi signifas *lingvoperi*, *translingvigi mesaĝon de unu lingvo kaj kulturo en alian lingvon kaj kulturon*, ĉu per *tradukado* ĉu per *interpretado*.

**13** Zu einigen Funktionen von Übersetzungen im Esperanto (*Pri kelkaj funkcioj de tradukoj en Esperanto*)

- 13.1 Nichtvermittelte internationale Kommunikation (*Senpera internacia komunikado*)
- 13.2 Einige Funktionen von Übersetzungen bei Esperanto (*Kelkaj funkcioj de tradukoj ĉe Esperanto*)
- 13.3 Esperanto-Übersetzungen aus welchen Sprachen? Einige quantitative Angaben (*Esperanto-tradukoj el kiuj lingvoj? Kelkaj kvantaj indikoj*)

**14** Zamenhof als Übersetzer (*Zamenhof kiel tradukanto*)

- 14.1 Einleitung (*Enkonduko*)
- 14.2 Die Anfänge: „Prä-Esperanto“ (1881-82) (*La komencoj: "Pra-Esperanto" [1881-82]*)
- 14.3 Vom „Patronia“ bis „La batalo de l'vivo“ von Ch. Dickens (1891) (*De „Patronia“ al „La batalo de l' vivo“ de Ch. Dickens [1891]*)
- 14.4 Die Dramen (*La dramoj*)
- 14.5 Die Prosastücke (*La prozaĵoj*)
- 14.6 Die Sprichwörtersammlung (*La Proverbaro*)
- 14.7 „La Malnova Testamento“ (1907-1917)
- 14.8 Zur Bedeutung der Übersetzungen Zamenhofs für die Entwicklung des Esperanto (*La signifo de la tradukoj de Zamenhof por la evoluo de Esperanto*)
- 14.9 Abschließende Bemerkungen (*Finaj rimarkoj*)

Veröffentlichungen von Detlev Blanke 2001-2005 (*Publicaĵoj de Detlev Blanke 2001-2005*)  
Literaturverzeichnis (*Bibliografio de la uzita literaturo*)  
Sachindex (*Temindekso*)  
Personenindex (*Personindekso*)

La libro estas havebla ĉe UEA aŭ rekte ĉe la eldonejo:

Peter Lang GmbH  
Europäischer Verlag der Wissenschaften  
Eschborner Landstr. 42-50  
D- 60489 Frankfurt/Main

Telefono: +49-69-780705-0, Fakso: 49-69-780705-50,  
Retadreso: [zentrale.frankfurt@peterlang.com](mailto:zentrale.frankfurt@peterlang.com) , [www.peterlang.de](http://www.peterlang.de)

## **7 Bibliografio de la verkoj de Reinhard Haupenthal**

Okaze de la 60-jariĝo de Reinhard Haupenthal (17.2.2005), aperis jena bibliografio de liaj verkoj:

*Holzbauer, Hermann (Hrsg.)(2006): Reinhard Haupenthal. Bibliographie seiner Veröffentlichungen. Esperantologie – Interlinguistik. Bearbeitet von Hervé Vallon (Schriften der Universitätsbibliothek Eichstätt 63), 142 S. 34,80 EUR. ISBN 3-447-05318-6*

Reinhard Haupenthal apartenas al la plej gravaj nuntempaj interlingvistoj kaj esperantologoj. Dum la lastaj jaroj li aparte okupiĝis pri Volapuko, eldonis kelkajn festlibrojn kaj esperantigis germanan literaturon. Krome Haupenthal laboris kiel eldonisto, redaktoro kaj bibliografo. Ekde 1999 li vivas en la Provenco/ Suda Francio.

La bibliografio entenas du dulingvajn prefacojn (en la germana kaj en Esperanto), nome de la prezidanto de la Katolika Universitato Eichstätt-Ingolstadt *Ruprecht Wimmer* kaj de la prilaborinto *Hervé Vallon*, kronologie ordigitan biografian dataron, dulingvan interparolon inter *Reinhard Haupenthal* kaj *Jacques Bernard* pri la temo „La esperantologo ne povas ignori Volapükon“ (sic). Por la tempo 1962-2005 la bibliografio registras 854 unuojn. Sekvas listo de menciitaj revuoj kaj personindekso, kiuj helpas la orientiĝon.

En la prefaco de la universitata prezidanto oni legas:

„Per la akiro de stokoj el antikvaĵejoj, transprenitaj bibliotekoj kaj eldonejaj arkivoj, inter ili antaŭ ĉio la arkivo de la eldonejo Kösel, la Universitata Biblioteko Eichstätt-Ingolstadt ekposedis ĉiujn verkojn de Joseph Stempfll kaj parton de la publikigaĵoj de Johann Martin Schleyer. La verkoj de ambaŭ aŭtoroj nun rangas kiel bibliografiaj raraĵoj. Lige kun la ĉirilataj akiroj la Katolika Universitato Eichstätt-Ingolstadt per transdona kontrakto de la 19-a de januaro 2005 sukcesis alirebligi al la publiko la ampleksan kaj kredeble unikan kolekton de plan-lingvoj (arkivo kaj biblioteko) de la internacie rekonata interlingvisto, Reinhard Haupenthal, kiu de 1968 ĝis 1994 aktivis kiel instru-komisiito por esperantologio kaj interlingvistiko en la universitato de Saarbrücken. Sinjoro Haupenthal akiris renomon tiel per siaj laboroj en la kampo de esperantologio, de la planlingvoj, ekz. de Volapük, kiel ankaŭ per siaj Esperanto-tradukoj el la germana beletro, pri kio elokvente atestas ne laste la nun prezentata publikigaĵo. Kiel danko-signon la Universitato deziras oferti al sinjoro Haupenthal la prezentatan bibliografion de liaj publikigaĵoj kun preskaŭ 900 kontribuoj“ (germana teksto: p. 9/10; esperanta traduko ĉi-tie citita: p.11)

La libron oni povas mendi ĉe la eldonejo:

Harrassowitz Verlag 65174-Wiesbaden, [verlag@harrassowitz.de](mailto:verlag@harrassowitz.de), fax ++49-(0)611-530 999.

Komento:

1. La eldonaĵo estas modela. Estas dezirinde, ke ankaŭ aliaj interlingvistoj zorgu pri adekvata eldono de siaj bibliografioj. Bibliografioj ankaŭ aperis en festlibroj de honorigoj. Ĉi-rilate Haupenthal meritiĝis, ĉar ki supozeble enkondukis la ĝenron festlibro en la interlingvistikan fakan literaturon (por Albault, Burkhardt, de Diego, Haupenthal por si mem, Waringien).
2. Estas maloftaĵo, ke neesperantista institucio eldonas la bibliografion de interlingvisto.
3. Pri la transdona kontrakto inter Reinhard Haupenthal kaj la Universitato Eichstätt-Ingolstadt en la jaro 2005 oni povis legi en regiona gazeto. Lige al tio estiĝis diversaj onidiroj. Nun la citita teksto klare indikas, ke la kontrakto vere ekzistas. El la teksto oni devas konkludi, ke la transdono jam okazis, ĉar la „[...] kontrakto... sukcesis alirebligi al la publiko...la kolekton...“. Tamen estas apenaŭ kredeble, ke Reinhard Haupenthal jam ĉion transdonis al la biblioteko. Li ja plulaboras kaj plupublikigas...
4. Necesas zorgi, ke grandaj interlingvistikaj trezoroj post la morto de la posedintoj ne malaperu, ne detruigu. Do jam nun la posedantoj de valoraj kolektoj devas imiti la paŝon de Haupenthal kaj certigi la estonton de la kolektoj per kontrakto kun arkivoj aŭ aliaj sciencaj institucioj (ekz. pri la kontrakto de *Wera* kaj *Detlev Blanke* kun la Federacia Ŝtata Arkivo de Germanio kp. IpI 56, p. 23).
5. Necesas substreki, ke ne nur temu pri biblioteko, sed ankaŭ pri arkivaĵoj (manuskriptoj, sliparoj, korespondaĵoj, fotoj, kopioj kaj aliaj dokumentoj). Aparte pri ili oni ofte ne zorgas. Kvankam necesas fari ĉion por konservi la librojn, oni tamen konsideru, ke multaj difinitaj titoloj ĝenerale ekzistas en kelkaj kolektoj. Tamen la arkivaĵoj plej ofte estas unikaj kaj pro tio

altvaloraj dokumentoj por la scienca historiografio.

6. La Esperanta parolkomunumo ne havas funkciantan strategion pri tio, kiel certigi la konservon de siaj bibliotekoj kaj arkivoj, kiuj ja estas la materiigitaj memoro kaj spertaro de unika kultura movado. Ja ekzistas kelkaj bonegaj *privataj* arkivoj. Tamen, kio okazos post la forpaso de la fondinto kaj prizorganto? Kia estas la situacio de la Hispana Esperanto-Muzeo post la forpaso de *Luis Hernández Yzal*? Ekzistas kelkaj gravegaj kolektoj, kiuj troviĝas kadre de komunumaj instalaĵoj, ekz. CDELI (biblioteko kaj arkivo) en la urba biblioteko de la svisa La Chaux-de-Fonds. Kio okazos, se la senlaca *Claude Gacond* ne plu povos okupiĝi pri la kolekto? Ĉu jam estas enlaborigata(j) posteulo(j)? Kio okazos kun la grandega kolekto (fakte biblioteko, ne arkivo) de Germana Esperanto-Instituto, kiu troviĝas en la sudgermana urbo Aalen, se iam estingiĝus (kion ni ne esperu) la tiea Esperanto-grupo, ne plu troviĝos prizorgantoj de la biblioteko? Sekuran pozicion plej verŝajne havas la kolekto de planlingvaĵoj, parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko, konata sub la iom misgvida nomo „Internacia Esperanto Muzeo Wien“ (IEMW). Sed ankaŭ tie multo dependas de la profesia agado de la fakaj bibliotekistoj. Ĉu iam povus okazi, ke ekzemple pro monmanko oni simple ĉesigos la profesion prizorgadon de la ekzotika kolekto kaj forŝlosos ĝin en ne plu alireblan arkivon?

7. Se sub 6 mi skribis, ke mankas funkcianta strategio, mi ja agnoskas, ke okazis kelkaj gravaj paŝoj:

Estiĝis la fondaĵo Thorsen (ĉe UEA), kiu ĉiujare subvencias difinitajn bibliotekojn. Helpe de la usona fondaĵo ESF (Esperanto-Studies Foundation) por certa tempo (eble du jaroj) estis pagita oficisto, kiu devis okupiĝi pri la biblioteko Hodler en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. La temo „bibliotekoj kaj arkivoj“ foje estas traktita en esperantaj revuoj. La esperantologia konferenco traktis la temon kadre de la 77-a Universala Kongreso 1992 en Vieno. En la kadro de la aranĝoj de la nove fondita kleriga centro de Germana Esperanto-Asocio en Herzberg (Harc-Montaro) en la jaroj 2005 kaj 2006 la temo estas traktita en du-tagaj seminarioj. Kaj ekzistas pliaj menciindaĵoj.

8. Kio farendas? Laŭ mi i.a. necesas jenaj paŝoj:

8.1 Starigo de konstanta komisiono ĉe la Komitato de UEA aŭ ĉe la Akademio de Esperanto, kiu okupiĝu pri la temo „Bibliotekoj kaj arkivoj“. Al la komisiono apartenu profesiaj fakuloj kaj kompetentaj koncernitoj (do posedantoj de gravaj kolektoj, kiuj orientiĝas pri la problemoj).

8.2 Ellaboro de aktuala superigardo pri la tutmonda situacio de interlingvistikaj/esperantologiaj kolektoj (tio kompreneble inkludu ankaŭ gravajn privatajn Esperanto-bibliotekojn) kaj aperigo de koncerna dokumento. La dokumento ankaŭ priskribu la solvendajn problemojn.

8.3 Ellaboro de konkludoj pri la entreprenendaj paŝoj surpaze de la dokumento kaj paŝon-post-paŝa realigo de ili.

---

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, **Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, [dblank.gil@snafu.de](mailto:dblank.gil@snafu.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur diskedo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantaj bonvenas.**

---